

# LA GAZETO

## ENHAVO

### LA PRINCO ĈE

### LA HUNOJ

Rakonto

Eugene DE ZILAH ..... 3

### Armela LEQUINT

### kaj ĴAK LE PUIL

Ĵak kaj Armela ..... 11

### FRAGMENTO EL LA

### OSIEK-PREMIITA

### TRADUKO

*Vojaĝo ĝis noktofino*

de Louis-Ferdinand CÉLINE

tra Armela LEQUINT kaj

Ĵak LE PUIL ..... 14

### AGI POR ESPERANTO –

### SUKCESE KAJ TRAGIKE

Intervjuo

kun Grigorij DEMIDJUK

pri lia aktivado en kaj por SEU

*Enkonduko*

Detlev BLANKE ..... 15

*Kiu estis Grigorij DEMIDJUK?*

Detlev Blanke ..... 16

*La intervjuo* ..... 17

### JARO DE KEROUAC

Peter BROWNE ..... 32

### VOJAĜU KUN

### PAUL GUBBINS

*Kunvojaĝu,*

internacia kurso de Esperanto

de Paul GUBBINS

recenzo: RÖSSLER Franz-Georg .. 34

### MI ŜATUS RESPONDI...

Trevor STEELE ..... 34

### ĈU VI JAM SCIAS...?

Pri arkiva fototeko...

Pri honorigoj...

Pri libroj kaj libretoj...

*Ekzile*, Mircea ELIADE, tra I. ONET

*Bedaŭrinda Verko*, I.F. BOCIORT

*Afero de espero*, Heidi GOES

*L'espéranto par la méthode directe*,

Stano MARĈEK, tra Daniel LUEZ

*Une langue naturelle*, A. CHERPILLOD

*Vivo de Zamenhof*, E. PRIVAT

Pri OSIEK... ..... 35

**IEK '2008 en NOVA GORICA,  
SLOVENIO, 12-18 julio 2008**

**pri “FERNANDO DE DIEGO –  
VIVO KAJ VERKARO”**

# AGI POR ESPERANTO – SUKCESE KAJ TRAGIKE

*Intervjuo kun Grigorij DEMIDJUK pri lia aktivado en kaj por SEU*

## Enkonduko

La 29-an de aprilo 1982, do antaŭ 25 jaroj, en moskva loĝejo, mi havis la emociigan ŝancon intervui unu el la ĉefaj aktivuloj de “Sovetrespublikara Esperantista Unio” (SEU), Grigorij DEMIDJUK. La intervjuon ĉeestis ankaŭ Semjon N. PODKAMINER<sup>1</sup>, kiu peris la kontakton kaj disponigis ejon, kaj Anatolo GONĈAROV<sup>2</sup>. Ambaŭ fojfoje intervenis en la intervjuon. Krom ni nur Ed BORSBOOM havis la eblecon intervui Demidjuk. Tio okazis en la jaro 1973 (kp. Borsboom 1976, p. 2).

La intervjuon A. Gonĉarov kaj mi registris sonbende. Pri la intervjuo kaj la intervjuito mi iom detale skribis en la revueto de GDREA, *der esperantist*, aldonante bibliografion kun 46 titoloj el lia esperantista verkaro, kiun Demidjuk poste korektis kaj kompletigis<sup>3</sup>.

1. Semjon Naumoviĉ PODKAMINER (1901 - 1982), profesoro pri ekonomio de aertransporto ĉe la Aertrafika Altlernejo en Leningrado (vicrektoro kaj poste rektoro), dum la Dua Mondmilito kolonelo de la Ruĝa Armeo, ĉefo de la 7-a fako de la Leningrada Fronto dum sieĝado (“Speciala Propagando” germanlingve direktita al la germana armeo); esperantisto ekde 1920, kunorganizis la fondkongreson de SEU en 1921 kaj la 6-an SAT-kongreson 1926 (kiel sekretario de la kongresa komitato) en Leningrado. Li estis membro de Centra Komitato (CK) de SEU, prezidanto de la Junulara Sekcio de SEU. Post la morto de Stalin (1953) li multe meritiĝis pri la (kvankam limigita) reaktiviĝo de la sovetia Esperanto-movado, havis multajn funkciojn en la sovetia kaj internacia movado (i.a. en Mondpaca Esperanto-Movado, MEM), estis i.a. vicprezidanto de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, ASE (fondita en 1979) ktp., fariĝis honora membro de UEA (pli detale vidu *der esperantist* (Berlin, organo de GDREA) 16(1980) N-ro 104 (6/80), p. 121 - 123.

2. Anatolo GONĈAROV (1941 -), d-ro de kemio, unu el la plej konataj aktivuloj de la sovetia kaj (nuna) rusia Esperanto-movado, fondis kaj gvidis multajn klubojn, vendas esperantologie, tradukas, instruas.

3. Vidu *der esperantist* (de) 20(1984) N-ro 123 (1/84), p. 5-7: *Renkontiĝo kun Grigorij Demidjuk*. Kompletigo aperis en *der esperantist* 21 (1985) N-ro 132 (4/85), p. 82. Krome vidu la leteron de Demidjuk *Mi ne timas persekutojn* en: *La Ondo de Esperanto*, 2/1997 kaj Sidorov 2005.

La kunredaktisto de *La Gazeto*, Madeleine DE ZILAH, min petis – por mi tute surprize kaj samtempe ĝojige –, disponigi al ŝi la sonbendon por eventuala aperigo en *LG*. Neimageble: ŝi volis tajpi la parolitan tekston...! Kia tasko!! La afero ja estas ege malfacila, ĉar Grigorij Demidjuk parolis tre mallaŭte, menciis foje rusajn nomojn de personoj kaj institucioj malfacile kompreneblajn por nerusaj oreloj. Krom tio la intervjuo svarmas pro aludoj pri detaloj el la historio de SEU.

Post kelka tempo mi ricevis de ŝi la tutan tajpitan tekston.

Kompreneble mi reaŝkultis la kompletan intervjuon kaj denove entrempiĝis en la atmosferon de la moskva ĉambro, ĉe kies tablo sidis la historio, samtempe glora kaj tragika. La intervjuo min tuŝis ankaŭ pro tio, ĉar mi persone konatiĝis kaj kunlaboris kun kelkaj el la menciitaj personoj (la germanoj BÄSSLER, KAMPFRAD kaj ZIMMERMANN, la aŭstro WÜSTER, la rusoj BOKARJOV kaj DANOVSKIJ kaj la armeno SEVAK)... La aŭskultaĵon mi detale komparis kun la tajpita teksto. Ĉe tiu malfacila materialo estis tute nature, ke ne malofte mi povis precizigi detalojn, forigi misaŭditaĵojn, fojfoje korekti la nomojn de la intervenintoj k.s.

Multajn detalojn de la teksto oni nur malfacile komprenos sen scio pri la historia fono. Pro tio mi aldonis notojn, ĉar estis mia celo kiom eble plej komplete komprenebli la tekston. Aldonante la notojn pri multaj aktivuloj de SEU mi kun konsternego pluan fojon rekonsciiĝis pri la senelekta murdo-maŝino de STALIN, en kiu pereis multaj el la plej bonaj kapoj de la sovetia (kaj internacia!) Esperanto-movado antaŭ la Dua Mondmilito. Des pli mi ĝojas, ke per tiu teksto en *La Gazeto* eblas omaĝi al unu el la ĉefaj figuroj de la Esperanto-movado inter la du mondmilitoj, kaj per la mencio de liaj kunaktivintoj ni honoras ankaŭ ilin.

Mi akustike ne plu ĉion klare perceptis. Krom tio, post 25 jaroj, mi kompreneble forgesis pri diversaj detaloj. Restis kelkaj duboj pri nomoj kaj eldiroj. Pro tio pri trarigardo mi petis Anatolo SIDOROV el Peterburgo, kiu bone orientiĝas en la historio de SEU. Li donis al mi multajn gravajn korektojn kaj kompletigojn. Do, ĉi-loke grandán dankon al li!

**K**ompreneble rememoroj ĉiam estas subjektivaj kaj ne povas esti la 'plena historia vero', se io tia entute ekzistas. Tamen, ĉiukaze utilis ankaŭ legi la libron de Ed Borsboom pri la vivo de LANTI (aparte Borsboom 1976, p. 29-144), en kiu li ofte mencias la ĉefajn aktivulojn de SEU kaj la problemojn de la rilatoj inter SEU kaj SAT. La samo validas pri la konata libro de Ulrich LINS pri la persekutoj (Lins 1988).

La leganto rimarkos, ke temas pri parolata lingvo, kiu grave diferencas de la skribata.

Mi nur malmulte redaktis ĝin, foje forigis ripetojn aŭ similaĵojn, tipajn por la leĝera parola esprimo. Mi kompreneble ne ŝanĝis la stilon, ankaŭ ne aldonis la difinan artikolon, kie neslavoĵ ĝin metus.

La ellasaĵojn mi markis per [...].

### **Kiu estis Grigorij Prokopjeviĉ Demidjuk?**

**G**rigorij P. Demidjuk naskiĝis la 28-an de januaro 1895 en Moskvo (laŭ la gregora kalendaro: la 9-an de februaro). Post siaj

4. Jen kelkaj titoloj, kiujn liveris al mi Anatolo SIDOROV:

– ANTULAJEV, Je.V / ASSONOV, V.A. / DEMIDJUK G.P. (1936): *Spravoĉnik po vzryvnomu delu (Informlibro pri eksplodaĵoj)* Moskvo: ONTI (Otdel Nauĉno-teĥniĉeskoj informacii – Fakto de la scienc-teknika informaro).

– DEMIDJUK, G. (1937): *Vzryvnye raboty (Prieksplođaj laboroj)*, Moskva.

studoj en Moskvo li fariĝis min-inĝeniero, doktoriĝis en 1938 (laŭ rusa titolo: "kandidato de teknikaj sciencoj"), post malliberiĝo (1938-1945) kaj reveno el siberia ekzilo (1945-1956) li habilitiĝis ("doktoro de sciencoj") kaj fariĝis profesoro en la Instituto de Min-industrio de Akademio de Sciencoj de USSR. Li publikigis kaj redaktis multajn faklibrojn<sup>4</sup>, kaj estis distingita per la titolo "merita aganto en scienco kaj tekniko". Li mortis la 6-an de novembro 1985 en Moskvo.



Grigorij Demidjuk 17-jaraĝa, en 1912.

Esperantisto ekde 1909, en 1913, kiel studento, Grigorij Demidjuk komencis aktivi en la Moskva Societo Esperantista kaj post la milito, en 1921, renovigis sian aktivan laboron. Li fariĝis unu el la ĉefaj agantoj de la sovetia Esperanto-movado ĝis la tempoj de la persekutoj. En 1922 li kunfondis kaj redaktis la kultur-sciencan revuon *La Nova Epoko*, krome redaktis aliajn sovetiajn Esperanto-periodaĵojn, multe verkis kaj tradukis.

Ekde 1923 li estis organiza sekretario de SEU, daŭre apartenis al la gvidantaro de SEU, aparte okupiĝis pri ties eldona agado kaj pri financoj. Li aktivis en SAT ĝis ties konfliktoj kun SEU kaj la estiĝo de opozicio en SAT. Ĝis sia vivo-fino li ne perdis la kontaktojn kun la Esperanto-movado, sed bedaŭrinde ne sukcesis realigi sian planon verki siajn memoraĵojn. Des pli valora estas la suba intervjuo.

Berlin, aŭgusto 2007

**Detlev Blanke**

dblank.e.gil@snafu.de

– DEMIDJUK, G. (1968): *Razvitie vzryvnogo dela v SSSR za 50 let (Evoluo de prieksplođaj laboroj en USSR dum 50 jaroj)*, Moskva, 16p.

– DEMIDJUK, G.P. / Bugajskij, A.N (1975): *Sredstva mekanizacii i teĥnologija vzryvnyĥ rabot s primeneniem granulirovannyĥ vzryvĉatyĥ veŝĉstv (Iloj de mekanikigo kaj teknologio de prieksplođaj laboroj kun la apliko de granulaĵ eksplodaĵoj)*, Moskva: Nedra, 312p.

## La intervjuo

*Al la unua demando de Detlev Blanke (DB) pri sia esperantistiĝo Grigorij Demidjuk (GD) respondis:*

**Grigori Demidjuk** : Mi revenis Moskvon de sur la batalkampoj en la jaro 1920. Kaj tiutempe mi havis neniun ligan kun Esperanto-movado. Tute hazarde sur la strato, nun nomata Puŝkin-strato, mi vidis diversajn afiŝojn pri Esperanto. Tie estis Moskvo-organizaĵo de SEU. Tiamaniere mi kontaktiĝis, verŝajne en la jaro 1921-a, eble 1920-a, mi ne memoras. Nu, tiutempe, en Moskvo-organizaĵo estis esperantistoj de diversaj direktoj. Estis tiuj, kiuj nomis sin neŭtralaj, inter ili estis sufiĉe aktivaj, kiuj multon faris por propagandi Esperanton. Kaj tie mi konatiĝis kun kamaradoj Nekrasov<sup>5</sup>, Poljakov<sup>6</sup>, Gajdovskij<sup>7</sup>. Ilin unuigis la ideo ke Esperanto povas disvolviĝi nur se ni uzas Esperanton praktike, por la bezonoj de nia sovetia lando. Kaj ni organizis ian grupon “La Nova Epoko”.

**Detlev Blanke** : Ĝi nomiĝis “La Nova Epoko”?

**GD** : Jes. Kaj ni komencis eldoni gazeton *La Nova Epoko*<sup>8</sup>. Ni ĝin presis apud Moskvo

5. Nikolaj V. NEKRASOV (1900 - 1938) estis ĵurnalisto, 1918 - 1919 prezidanto de Tutrusia Ligo de Junaj Esperantistoj, 1923 membro de CK SEU, speciale okupiĝis pri historio kaj kritiko de la Esperanto-literaturo, ideologio de la proleta revolucia Esperanto-movado kaj pri interlingvistiko (kosmoglotiko), en 1931 kunfondis IAREV (Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj) kaj redaktis ĝian revuon *La Nova Etapo*. Li multe tradukis (i.a. *Eŭgeno Onegin* de PUŜKIN) kaj verkis originale. Pro falsaj akuzoj mortpafita en 1938, rehonorigita en 1957. (Laŭ Vikipedio).

6. Valentin I. POLJAKOV (1896 - 1938), rusa instruisto por la germana, mortis en siberia ekzilo, en 1957 rehonorigita (laŭ N. STEPANOV en <http://pri-historio.boom.ru/mihxal.htm>, 5.8.07)

7. Sergej GAJDOVSKI (ankaŭ HAJDOVSKIJ) estis anarkiisto, en 1925 kune kun 80 aliaj anarkiistoj el Moskvo kaj Leningrado estis arestita. Li estis ekzilita al Kazaĥstano (kp. LINS 1988, p. 214).

8. *La Nova Epoko* estis internacia literatur-socia revuo fondita en junio 1922 de la kvar moskvaj esperantistoj, Grigorij DEMIDJUK, Natan J. FUTERFAS, Nikolaj V. NEKRASOV kaj Valentin I. POLJAKOV. Ekde aŭgusto 1923 ĝi iĝis aldona kajero de *Sennacieca Revuo* de SAT, kiu estis presita en Leipzig/Germanio, kvankam la redakcio plu restis en Moskvo. De oktobro 1928 ĝis februaro 1933 *La Nova Epoko* aperis, poste definitive malaperis pro financaj malfacilaĵoj (Vd. Vikipedio).

en malgranda presejo, kiu apartenis al iama delegito de UEA. Mi forgesis la nomon<sup>9</sup>.

**Anatolo Gonĉarov (AG)** : Ne gravas. Sed, apud Moskvo en Tajninskaja ...

**GD** : Ha! Tajninskaja, tie. Tie laboris kelkaj esperantistoj, laboris Sutkovoj<sup>10</sup>[...] Do niaj manuskriptoj veturis al Tajninskaja. Tie oni kompostis, mi helpis kaj komencis turni la presmaŝinon kaj komencis eldoni tiun gazeton.

**DB** : Pardonu, ĉu vi redaktis tiun revuon?

**GD** : Ĝi estis kolektive redaktita.[...]

Precipe mi kaj Nekrasov, sed aktive partoprenis ankaŭ Gajdovskij kaj Futerfas<sup>11</sup>. Tiu gazeto tuj permesis al ni trovi ligojn kun aliaj landoj. Ni sendis ĝin, ni ricevis respondon, kontakte. Kiam en la jaro 1922-a vizitis Moskvon Lanti<sup>12</sup>, li vizitis Drezen<sup>13</sup>, li vizitis la loĝejon de Nekrasov, kiu estis ejo, en nia malnova epoko malgranda ĉambreto. Jen, li kaj ni multe intertraktis pri la esperantista laboro. Kaj la komuna vidpunkto estis tiu, ke SAT, same kiel ni, uzas Esperanton por la

9. Temas pri S. ŠABUNEVIČ (laŭ letero de GD de 28.6.1983 al Oleg I. KRASNIKOV).

10. Vladimir SUTKOVJ (1904 - 1937), elektristo, esperanta poeto, en 1937 mortpafita (Nikolaj STEPANOV en: <http://pri-historio.boom.ru/mihxal.htm>, 5.8.07).

11. Natan J. FUTERFAS (1896 - 1937) naskiĝis en Lodzo, ekde 1917 aktivis en Moskva Esperanto-Instituto, kiel anarkiisto, kelkfoje arestita kaj ekzilita al Siberio, en 1939 pro falsaj akuzoj mortpafita (Vikipedio kaj STEPANOV 1993).

12. Pri la vivo kaj rolo de la fondinto kaj ĉefa animanto de SAT, la franco Eŭgeno LANTI, (reale Eugène ADAM, 1879 - 1947), vidu BORSBOOM 1976.

13. Ernest Karloviĉ DREZEN, latvo, (1892 - 1937), ekde la fondo de SEU en 1921, prezidanto de CK de SEU kaj poste (1924 - 1936) ĝia ĝenerala sekretario, sub la aspektoj teoriaj, ideologiaj kaj gvidaj estis la centra figuro en la sovetia Esperanto-movado ĝis la persekutoj. Laŭ klero li estis teknikisto, havis kelkajn tre altajn poziciojn en la administracio de Soveta Unio, fariĝis specialisto pri terminologio-normigo kaj raciigo de laboro. Li multe verkis pri raciigo, tekniko, internacia lingvonormigo kaj diversaj sociaj problemoj. Inter esperantistoj li aparte konatiĝis per fundamentaj verkoj pri internaciaj lingvoj, pri historio de la E-movado kaj pri Zamenhof. Pro falsaj akuzoj li estis mortpafita en 1937. Li estis rehonorigita en 1957 (Kp. KUZNECOV 1991 kaj STEPANOV 1992.) (Vd. ankaŭ la noton 44).



praktikaj celoj, ne alcele de propagando de la lingvo, sed uzo de la lingvo por la celoj de proleta revolucio, por la bezono de Sovetunio ktp. Kaj estis organizita financa ligo kun SAT. Ni akceptis tie ĉi abonojn, transsendis ilin; kaj tiamaniere povis en Sovetio esti abonata la *Sennaciulo*. Poste okazis iu malkonsento kun la gvidantoj de SEU, kun Drezen. Tio okazis pro nekompreneo kaj helpe de iu franco, li venis Moskvon, [...] (*ne eblis ekscii, pri kiu temis – DB*).

**GD:** Li faris tiam nelegalan laboron, kon-taktajn ligojn inter Francio kaj Sovetio. Li laboris kune kun fratino(j) de Menĵinskij<sup>14</sup>. Mi forgesis ankaŭ la nomon [...]. Do li helpis al ni kontakti kun Drezen por interkompreni nin, kaj de tiu momento oni kooptis min kaj Nekrasov en Centran Komitaton de SEU. Tio estis verŝajne en la jaro 1922a-23a; kaj de tiu tempo ni daŭrigis gvidi la eldonadon de *La Nova Epoko*, de kelkaj libretoj, kiujn ni povis eldoni, precipe estis poezio de Miĥalski<sup>15</sup>, de Nekrasov. Kaj samtempe mi komencis labori en CK SEU, plenumante la organizaajn taskojn.



Literatura grupo de sovetiaj esperantistoj (de maldekstre): Demidjuk, Poljakov, Miĥalski, Rublov, Nekrasov.

**DB:** Honorofice?

**GD:** Honorofice, jes: organizaajn taskojn. Mi tiam estis juna; mi povis labori tage kaj nokte, kaj jen mi akceptis la kotizojn, sendis la biletojn kaj mi organizis tiam eldonadon de *Bulteno de CK SEU*, kiu estis senpage sendata al ĉiuj membroj de SEU, ĝi estis en Esperanto, kaj eldonadon de dumonata *Mejdunarodnij jazyk*<sup>16</sup>, kiu estis direktita por konatigi ne-esperantistojn kun la esperantista movado, pli serioze, pli grave.

14. Vjatjeslav R. MENĴINSKIĴ (1874-1934), de 1926 – 1934 ĉefo de la sovetia sekureca servo (OGPU).

15. Eŭgeno MIĤALSKI (1897-1937), estis instruisto kaj bibliotekisto, tre sukcesa originala poeto de Esperanto, pro falsaj akuzoj mortpafita en 1937 (kp. MIĤALSKI 1994, krome N. STEPANOV en:

<http://pri-historio.boom.ru/mihxal.htm>, 5.8.07.)

**DB:** Ĉu mi povas demandi pri eldonkvanto de *Mejdunarodnij jazyk*? Proksimume?

**GD:** Nu *Mejdunarodnij jazyk*, mi ne memoras precize. Mi memoras, ke mi devis plenumi la tutan laboron. Mi trovis la presejon, Ĝi estas la presejo nomata “la 39a internacia presejo”, kiu antaŭe apartenis al Rjabuŝinskij<sup>17</sup> en angulo kontraŭ tiu presagentejo “Novosti”, antaŭa redakcio de *Ogonjok*<sup>18</sup>! En tiu verŝajne kvaretaĝa konstruaĵo estis tiu presejo [...]

Do, tie mi sukcesis ricevi krediton, do ni pagis ĉiam kiam ni havis monon. Oni presis por ni.

**AG:** Ĉu por ricevi krediton, kaj permeson, vi klopodis ĉe oficiala instanco?

**GD:** Ne. Simple mi venis, mi konatigis kun la direktoro de la presejo, mi klarigis niajn celojn, niajn taskojn. Li diris: Bone, mi kredas al vi. Jen mi donas al vi paperon, ni kompostos, ni presos, kaj vi, dum tri monatoj

post la afero, pagos la kostojn kaj tiamaniere ni disvolvis sufiĉe grandan eldonadon. Ni eldonis lernolibrojn, tiun de Rublov<sup>19</sup> ekzemple. Ni faris stereotipojn kaj kelkajn eldonojn per stereotipoj. Kaj la eldonado ĉiam donas monon por la organiza laboro, por ĉio. Kaj ni komencas ankaŭ eldoni librojn en Esperanto. Ni organizis

“komunistan bibliotekon”<sup>20</sup>, broŝurojn, ni organizis eldonon de apartaj libroj: ekzemple *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin en la traduko de

16. *Mejdunarodnij jazyk* t.e. *Internacia lingvo*, plejparte ruslingva organo de SEU. La eldonkvanto estis 4500 ekz.

17. Antaŭ la revolucio moskva familio de riĉuloj.

18. *Ogonjok* t.e. *La flameto*, sovetia kolore ilustrita politika-literatura semajna revuo, ekde 1923.

19. Sergej RUBLOV (1901-1979), inĝeniero-kemiisto, Esperantisto de 1919. En 1919-29 unu el gvidantoj de la esperantista movado en Odeso. En 1925-28 membro de CK SEU. Ekde 1929 membro de Internacia Lingva Komitato. Multe tradukis rusan literaturon kaj verkis esperantologiajn studojn. Lia ruslingva lernolibro (RUBLOV 1929) ankaŭ aperis en germana kaj franca tradukoj.

Li estis arestita sed liberigita. (kp. *Cerbe kaj kore*, Moskvo 2/1992, p. 1-4 kaj N. STEPANOV en:

<http://pri-historio.boom.ru/rublov.htm>, 5.8.07.)

Nekrasov. Do la laboro kreskis kaj SEU fariĝis reale aktiva kaj tre vasta organizaĵo, kaj tio estis tre grava. Nu, necesis trovi lokon, kien ni povus venigi la presaĵojn, ĉiujn eldonaĵojn. Ni trovis tiun lokon [...]: ĝi estis kelo, sub teretaĝo, estis granda ejo, kaj tie ni havis la tutan deponejon de niaj eldonaĵoj kaj ni jam dungis oficiston, estis kamarado Gavrilov<sup>21</sup>, esperantisto. Li laboris kiel librovendisto en librejo ĉe strato-angulo de Gorkij kaj nuna Marx. [...] Li fariĝis nia laboranto, ni pagis al li salajron, li ekspedis literaturon ktp. Kaj tiamaniere ni sukcesis organizi sufiĉan bazon por interrilatoj. Tre multe helpis Drezen en tiu laboro, li estis en la jaro 1917a komandanto de "Tavriĉeskiĵ dvorec"<sup>22</sup>. Post kiam la registaro transloĝiĝis Moskvon li fariĝis afergvidanto de tutrusia plenumkomitato VCIK<sup>23</sup>. Tie li laboris, havante konstante ĉiutage rilatojn kun Kalinin<sup>24</sup> – tio estas tute konata – kaj tial ni sukcesis aperigi en SAT libron kun antaŭparolo de Kalinin. Ĝi estis la konstitucio<sup>25</sup>. Jen tion organizis Drezen, kaj nia zorgo estis precipe pri la landoj, kie regis la tiel nomata Blanka Teroro, t.e. Bulgario, Jugoslavio. Por

20. Temas pri serio de maldikaj broŝuroj kun simila grafika eksteraĵo, inter ili titoloj kiel: M. ŜEJNMAN, *Milito kaj religio* (1929, 34 p.); J. STALIN, *Pri Lenin* (1929, 23 p.); *Manifesto de la sesa kongreso de Komunista Internacio* (1929, 16 p.) ktp.

21. Petr A. GAVRILOV (1904–1943), en 1938 estis kondamnita al 8 jaroj da punlaboro en siberia gulago. En 1943 li estis liberigita pro malsano nekuracebla kaj samjare mortis pro distrofiio (kp. N. STEPANOV en

<http://pri-historio.boom.ru/gavrilov.ht:m>, 5.8.07)

22. En la Petrograda Taŭrida Palaco funkciis la Provizora Komitato de la Ŝtata Dumao, poste la Provizora Registraro. La Provizora Registraro anoncis pri Fondkunveno de la popoloj, soldataj kaj kamparanaj deputitoj por la 12. (25.) de novembro 1917. La 25-an de oktobro (la 7-an de novembro) 1917 la potenco en Petrogrado falis al bolŝevitoj. Ĝi per la taĉmento da maristoj dispelis la Fondkunvenon de popoloj deputitoj. La 7. (20.) de januaro 1918 VCIK laŭ raporto de Lenin anoncis dekreton pri malfondo de la Fondkunveno. Antaŭ la translokiĝo al Smolnij Palaco en aŭgusto de 1917 en Taŭrida Palaco funkciis VCIK. En la sama palaco ankaŭ okazis la 6-a SAT-kongreso 1926 en (tiam jam kun la nova nomo) Leningrado (laŭ Anatolo SIDOROV).

23. VCIK: Rusa mallongigo por *Vsesojuznyj Central'nyj Ispolnitel'nyj Komitet*. (Tutruslanda Centra Ekzekutiva

penetri tiujn, ni faris iun ruzaĵon: broŝurojn, librojn en Esperanto eldonatajn en Moskvo, iun parton de la eldonkvanto ni presis kun alia kovrilo, kie estis iu tute neŭtrala titolo, kaj tiamaniere ni sendis ilin al Bulgario, al Hungario, ien tien ...

**AG:** Eĉ en Japanion!

**GD:** Jes, ĉien kien ni povis penetri [...].

Nu tio estis ankaŭ sufiĉe granda laboro, kiu estis farita. Vi povas eble renkonti bulgarojn, kiuj povas memori pri tiu tempo [...].

La kontaktoj kun germanaj esperantistoj<sup>26</sup> unue efektiviĝis en la jaro 1926, kiam sufiĉe multe da kamaradoj venis al la SAT-kongreso en Leningrad; ĝi estis oficiale subtenita kaj estis grandaj partiaj gvidantoj, kiuj partoprenis la organizon<sup>27</sup> [...].

**GD:** Do tie venis el Germanio Bässler<sup>28</sup>, venis Richter<sup>29</sup> [...]. Venis Zimmermann Willi<sup>30</sup> ...

**DB:** ... kiu kunfondis Centran Laborrondon de Esperanto, kaj li mortis antaŭ 6-8 monatoj nur.

Komitato de Sovetoj). De 1921–1923 DREZEN fakte ne estis afergvidanto, sed vic-afergvidanto de VCIK (kp. KUZNECOV 1991, 16).

24. Miĥail I. KALININ (1875–1946), kunlaboranto de LENIN kaj STALIN, 1919–1922 prezidanto de Tutruslanda Centra Ekzekutiva Komitato de Sovetoj, 1923–1946 prezidanto de la Supera Soveto, do siatempe formale la ŝtatĉefo de USSR.

25. Temas pri: *Dokumentoj de Komunismo* (Enhavo: *Komunista Manifesto* de MARX kaj ENGELS; *Konstitucio de Ruslanda Sovetia Respubliko*; *Programo de Rusa Komunista Partio*; *Manifesto de Komunista Internacio*. (kun antaŭparolo de M.I. KALININ). Düsseldorf: SAT, 1923, 132 p.

26. La kontaktoj inter sovetiaj kaj germanaj esperantistoj dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj estis sufiĉe intensaj. (Kp. BLANKE 1986b).

27. En la *Protokolo de la VI-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, Leningrado, 6-10 aŭgusto 1926* (Ekstra numero de *Sennaciulo*, novembro 1926, 63 p.) oni trovas la salutmesaĝojn de Anatoli W. LUNAĈARSKI (siatempe "Popola Komisararo pri Klerigo", tio estas ministro) kaj Alexander J. FERSMAN (fama sciencisto, kunfondinto de la scienco pri geokemio, membro de la Akademio de Sciencoj de USSR). Okaze de la kongreso aperis aparta poŝtmarko pri Esperanto.

**GD:** Jes, mi legis en *der esperantist*.

**DB:** Willi Zimmermann venis el Ammendorf ĉe Halle. Kaj post la SAT-kongreso li migris al Jerevan, kaj tie konatiĝis kun profesoro Sevak<sup>31</sup>, kaj do ili revidis unu la alian en la jaro 1972 en Berlin. Tie, kortuŝa momento por ambaŭ.

**GD:** Nu lastatempe li loĝis ...

**DB:** ... lastatempe en Fürstenwalde.

**GD:** Fürstenwalde, jes. Mi korespondis kun li ĝis ... ĝis la pasinta jaro. Li estis tie ĉi en Moskvo dum 6-monata kurso de iuj administraciaj gvidantoj... Mi renkontiĝis kun li en la loĝejo de Bokarjov<sup>32</sup>.

**DB:** De la maljuna Bokarjov jam. Do en la 70-aj jaroj.

**GD:** Jes, jes, jes. Tiam mi renkontiĝis kun li, kaj mi rememorigis lin, kiam li estis en la SAT-kongreso. Estis Barthelmess<sup>33</sup>. Lanti ne venis. Kaj dum tiu SAT-kongreso, vidante ke Lanti faras multajn erarojn en gvidado de SAT, estis decidite, organizi komunistan sektion [...]. Poste en la jaro 1927-a, fine de tiu, aŭ komence de la jaro 1928-a Bässler kaj Kampfrad<sup>34</sup> venis Moskvon, tie ĉi estis interkonsentita la plua laboro. Kiam en la 1929-a jaro ni renkontiĝis denove dum la SAT-kongreso, en Leipzig<sup>35</sup>, la situacio estis sufiĉe akra. Ni devis deklari de la kongrestribuno, ke ni ne povas labori, se SAT daŭrigos la saman

28. Otto BÄSSLER (1897 - 1981), germano, kompostisto, estis unu el la plej influaj laboristaj esperantistoj en Germanio kaj en SAT. Li kuniniciatis la eldonejon EKRELO [vidu noton 36], la revuon *Internaciisto* [vidu noton 62], ambaŭ opoziciaj al SAT fine de la 20aj jaroj. 1930-1934 en kelkaj germanaj koncentrejoj. BÄSSLER apartenis al la kunfondintoj de la oficiala Esperanto-movado en GDR (GDREA, ekde 1965) kaj estis ties prezidiano (kp. KOLBE 1996, II-a parto, p. 78 - 81).

29. Karl RICHTER, germano, aktivulo de GLEA el Leipzig/Germanio.

30. Wilhelm ZIMMERMANN (1903 - 1981), germana oficisto, aktivulo de GLEA, laboris kaj migris en 1927 tra Sovetunio ĝis Jerevano, kunfondinto kaj prezidiano de GDREA.

31. Guren Grigori SEVAK, (1904 - 1981), armeno, profesoro pri lingvoscienco, unu el la plej gravaj esploristoj pri la armena lingvo, membro de kelkaj akademioj, unu el la plej gravaj armenaj esperantistoj (ekde 1921), kunfondinto de IAREV, estrarano de ASE (kp. *der esperantist* 18(1982) N-ro 112 2/82), p. 34.)

linion. Tiam Lanti petis min, ke mi organizu alian renkontiĝon kun Drezen, por ke ili venu al iu interkonsento. Tio okazis. La interkonsento estis aranĝita: pri tio oni deklaris dum la kongreso, kaj formale ĉio estis bona, sed nur formale, ĉar fakte, en *Sennaciulo* denove estis presataj multaj artikoloj, kiuj ne helpis al ni en nia esperanta laboro en Sovetio; kontraŭe, malhelpis. Mi devas ankoraŭ diri, ke kiam estis sufiĉaj ligoj kun SAT tiam *La Nova Epoko*, laŭ propono de Lanti, estis reorganizita kiel literaturscienca aldono de *Sennaciulo*, presata en Leipzig. La tutan organiz-laboron kun SAT, ĉiujn kontaktojn, jam plenumis CK SEU. Kaj tio estis mia zorgo kiel organiza sekretario kaj tio signifis ankaŭ eldonlaboron. Poste Lanti organizis ĝin en *Sennacieca Revuo* [...] kaj Lanti insistis, ke SEU nenion eldonu esperantlingve, ke SEU estas landa organizaĵo, nacia organizaĵo, kiu devas eldoni

32. Evgenij A. BOKAREV, (prononco: Bokarjov, 1904 - 1971), profesoro pri lingvoscienco, interlingvisto, specialisto pri kaŭkazaj lingvoj, vicdirektoro de la Instituto pri Lingvo-scienco ĉe la Akademio de Sciencoj de USSR. Esperantisto ekde 1918, membro de CK de SEU. Post la morto de Stalin, Bokarev, unua, iniciatis la rediskuton pri Esperanto en sovetiaj akademijaj medioj, publikigis en lingvistaj revuoj, kio grave influis la renaskiĝon de la Esperanto-movado en la aliaj orienteŭropaj landoj; en 1956 prezidanto de la Iniciata Grupo de Sovetiaj Esperantistoj, de 1962 ĝis sia morto prezidanto de Esperanto-Komisiono en SSOD (Unio de sovetiaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun eksterlando). Li verkis la ĝis nun plej bonajn vortarojn Esperanto-Rusa kaj Rusa-Esperanto. Li estis unu el la plej gravaj aŭtoritatoj de la sovetia Esperanto-movado (kp. *der esperantist* 7(1971) N-ro 47, p. 18 - 19.)

33. Norbert BARTHELMESS (1897 - 1987), germana ĵurnalisto, unu el la ĉefaj gvidantoj de SAT antaŭ kaj post la milito, redaktoro de *Sennaciulo* kaj *Nova Epoko*. 1939 - 1942 en francaj kaj germanaj koncentrejoj, post 1948 ĝenerala sekretario de la Plenumkomitato de SAT, multe tradukis kaj verkis originale. (kp.

[http://eo.wikipedia.org/wiki/Norbert Barthelmess](http://eo.wikipedia.org/wiki/Norbert_Barthelmess), 5.8.07)

34. Walter KAMPFRAD (1901 - 1980), germana metisto, esperantisto ekde 1921, intime kunlaboris kun Otto BÄSSLER en Leipzig, GLEA, estis formale estro de EKRELO [vd. noton 36], post 1933 pro sia esperantista agado kelkfoje enprizonigita, post 1945 en GDR prokuroro en la distrikto Leipzig (kp. KOLBE 1996, II-a parto, p. 81 - 83).

35. Vidu la viglan efion pri la IX-a SAT-kongreso 1929 en Leipzig/Germanio, kun malsamaj akcentoj en la germanaj socialdemokratiaj kaj komunistaj gazetoj de Leipzig (kp. KOLBE 1996, II-a parto, p. 40 - 65).



en sia nacia lingvo. Ni kontraŭdiris, ke unue Sovetio estas multnacia, due ke nia celo estas uzi Esperanton por Sovetio kaj ne labori por Esperanto. Tiumomente tre malboniĝis la financaj ligoj. La lando komencis jam sentisian planon, estis necesa mono, estis necesa valuto, la lando devis multon vendi, multon valoran, vendi al eksterlando por pagi por la maŝinoj, por la unuaj grandaj uzinoj, kiuj estis konstruataj, kaj pro tio, ĉiuj monataj transpagoj en valuto el Sovetio al Germanio estis ĉesigitaj [...] la lando ne povis permesi. Kaj do mi proponis al Lanti tre simple: Ni organizos en Moskvo eldonejon en Esperanto. Esperanto-librojn ni sendos al vi. Vi ilin vendos, kaj la tuta mono, kiun vi ricevos pro la vendo, ni uzos por abonpagoj por SAT-gazetoj kaj por la SAT-kotizoj. Tre simple. Kaj ni ankaŭ proponis la formalan eldonadon: ni fondis tie-ĉi eldon-kooperativon EKRELO, la libroj estis presataj en Moskvo, estis sur ili "eldonejo EKRELO"<sup>36</sup>. Tiamaniere estis presita

la esperantlingva libro de Drezen pri Zamenhof<sup>37</sup>, ŝajne la unua en tiu serio. Por kio? Por ke ni per tiuj libroj povu pagi al SAT. Lanti ne ŝanĝis sian vidpunkton kaj insistis, ke ni ĉesigu eldonadi literaturon. Tiamaniere estis perdita la eblo de financa ligo kun SAT. Ni ne plu povis akcepti kotizojn, ni ne plu povis akcepti abonpagojn kaj tiamaniere efektiviĝis tia organiza rompo de interrilatoj. Lanti, Barthelmess kaj la nunaj aktivuloj de SAT, rakontos pri tio, pri la peko de SEU, ke ni ŝtelis la monon de SAT ktp. Nenio simila! Ni faris ĉion kion ni povis fari, por ke nia laboro estu bone progresanta. Nu, fine de la 20aj jaroj, kiam mi estis en Leipzig en 1929-a, la faŝismo estis sufiĉe forta. Ni vidis tion reale en Berlin, en Leipzig; kaj estas tre interese, ke leipcigaj esperantistoj donacis al mi iun tian

ŝildon kun faŝista insigno, kiun ili konkeris de faŝistoj stratbatale.

**DB:** Kiel trofeon?

**GD:** Kiel trofeon. Kaj tion mi alportis al Moskvo, al la organizaĵo kie mi laboris. Do restis tiam ligo kun kamarado Kampfrad, kaj dum tiu faŝisma periodo ni interkonsentis, ke ni elektis ŝajne *Eŭgeno Onegin* kiel libron per kiu ni povus interŝanĝi la leterojn. Ni skribis leteron, en kiuj per la paĝo tia, vorton tia, kaj tiamaniere ni "skribis" leterojn [...].

Fine de la 1930-a jaro mi jam ne povis aktive partopreni en Esperanto-Movado, ĉar mia oficlaboro forrabis jam la tutan tempon,

**AG:** Kaj ĝis nun bedaŭrinde.

**GD:** Ĝis nun. Kial bedaŭrinde?

**AG:** Por ni bedaŭrinde.


**GD:** Mi ne bedaŭras, ĉar tiutempe mi malmulton faris, aktive partopreni mi ne povis. Mi povis aboni gazetojn, legi ion, sed por viziti kunsidojn, mi ne havis tempon, ĉar efektive mia laboro estis tre granda, ligita kun

veturado tra la tuta lando [...] La tuta tempo estis okupita. Do de tiu tempo sekve mi ne povis aktive partopreni, esti inter germanaj kamaradoj, miaj kontaktoj...

Mi fariĝis esperantisto en la jaro 1909-a kaj mi, de la komencaj monatoj korespondis kun diversaj landoj kaj mi havis unu korespondanton, Paŭlo Gedai en Halle ĉe Saale. Kiam mi venis al la Leipziger kongreso, kun mi ekparolis ankaŭ Paŭlo Gedai kaj lia filo.

36. EKRELO = Eldonkooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo. Eldonejo fondita je la iniciato de SEU en 1930. Aperis ĉ. 70 titoloj, ofte broŝuroj, sed ankaŭ gravaj sciencaj verkoj de DREZEN. La librojn oni redaktis kaj presis en Moskvo. La internacian distribuadon faris Walter KAMPFRAD en Leipzig (vidu noton 32), kiu en 1933 estis enprizonigita en Leipzig (kp. BLANKE 1991).

37. Vidu DREZEN 1929; represita en BLANKE 1986 (p. 125 - 165) kaj en DREZEN 1992 (p. 113 - 149).



Kongreslibreto de  
SAT-kongreso 1929 en Leipzig.

Estis ekskurso al Halle, dum tiu ekskurso mi vizitis la maljunulon, la patron, kaj mi kune kun hungara kamarado tranoktis en la loĝejo de Paŭlo Gedai, la juna<sup>38</sup>. Nu tie mi konatiĝis kun la vivmaniero de laboristoj. Por mi estis granda surprizo, kiam en tiu Halle estis tri-etaĝa domo, kaj kiam ni venis, Paŭlo atentigis min: Ĉi-tie ni havas elektrolumon, sed vi venu al mia loĝejo, kie ne estas elektrolumo, nur gaso, ĉar por la posedanto de domo ne estas profite pagi elektron [...]

**DB:** Lenin-verkaro<sup>39</sup> estas iu granda enigmo, ĉar ni ne scias, kie restas tiu manuskripto.

**GD:** Mi povas nur tion diri, ke fine de la 20-aj jaroj, en iu kunsido de Centra Komitato de SEU, kiu okazis en iu ejo, en la domo de verkistoj, ni pritraktis tiun problemon kaj decidis, ke ni havas la forton kaj devon eldoni elektitajn verkojn de Lenin. Estis farita plano de la eldono, kiujn verkojn ni devus eldoni. Estis distribuita laboro de la tradukado.

**DB:** Ĉu vi memoras, kiuj partoprenis?

**GD:** Mi partoprenis la redaktadon kaj la tradukadon kaj mi sendis la partan tradukon al kamarado Drezen – sed personan ligan tiutempe mi jam ne havis – kaj mi nenion scias, nenion aŭdis de iu ajn pri tio.

**DB:** Ie la manuskriptoj, aŭ almenaŭ parto de ili, devus troviĝi.

**GD:** Povas ĉio pereii.

**DB:** Jes, povas esti.

**GD:** Drezen kaj lia edzino estis arestitaj, la tiama organiza sekretario ankaŭ estis arestita kaj la tuta ejo restis senzorga.

**DB:** Pro tio eble malaperis...

**AG:** Kamarado Danovskij<sup>40</sup> diris, ke tuta libro-havaĵo estis transdonita al iu monaĥinejo, de iu eldonejo.

38. La patro kaj la filoj same nomiĝis Paul GEDAI.

39. Aperis aparta 15-paĝa prospekto pri la aperonta Lenin-verkaro en Esperanto: LENIN, V.I., *Elektitaj verkoj. En 16 volumoj en Esperanto*. Leipzig: EKRELO, 1932.

**GD:** Kiam mi estis en Moskvo, en tiuj jaroj, 37-a, 38-a, 39-a – dum tri jaroj mi estis en Moskvo en malliberejo, poste mi estis ekzilita al Siberio. Tie mi povis legi librojn el biblioteko



Grigorij Demidjuk, 33-jara, en 1928.

de Drezen [*esprimo de miro flanke de la intervjuanto*] ĉar ĝi estis konfiskita<sup>41</sup>. Versajne la libroj, kiuj havis iun komunan intereson, estis transdonitaj al diversaj bibliotekoj, kaj ĉio neinteresa eble estis bruligita aŭ mi ne scias...

**GD:** Poste multo estis bruligita en 1941a, kaj certe en tiuj monatoj, kiam la milito alproksimiĝis al Moskvo, en tiu organizaĵo en kiu mi laboris, laŭ rakontoj de miaj kunlaborantoj estis multo bruligita, ĉar oni ne povis ekspedi tion el Moskvo, kaj ni devis bruligi. Do, nenio estas konata. Mi mem tradukis, sed ne restas spuroj.

**DB:** Kamarado Demidjuk, ĉu vi povus iomete priskribi la personecon de Drezen? Kia homo estis Drezen?

**GD:** Nu, Drezen estis unue homo sufiĉe aktiva, energiplena. Lin interesis diversaj flankoj de la socia vivo. En la komenco de la 20aj jaroj, li laboris en VCIK kiel aferviganto, poste li estis direktoro de teknika instituto, preparis fakulojn por la popolo. [...] Poste li estis gvidanta laboranto en teknik-organiza kurso.

**DB:** Kaj laŭ profesio, ĉu li estis filologo, ĉu teknikisto?

40. Nikolaj DANOVSĜIĜ (1905 - 1988), inĝeniero, verkis pri esperantologiaj temoj, multe tradukis, longe laboris en la redakcio de la *Granda Sovetia Enciklopedio* kiel supera scienca redaktoro.

41. Pri tiu stranga fakto GD klarigas en letero de 28.6.1983 al Oleg KRASNIKOV jene:

«Post kiam estis reprezalita la edzino de Drezen, lia havaĵo estis, evidente, konfiskita. Sed kiam mi estis juĝesplorita, al ni al prizonoj ĉeloj oni alportis korbojn da libroj, por ke ni povus elekti por legado. Ŝanĝo de libroj okazis ĉiusemajne. Jen ĉi tie mi renkontis librojn kun surskribo "El la libraro de E.K. Drezen". La libroj estis en la rusa lingvo. Kien malaperis la libroj en Esperanta kaj aliaj fremdaj lingvoj – mi ne scias.»



**GD:** Li estis teknikisto. Li unue gvidis tiun novan hektografiitan bultenon *Peterburga Biblioteko*<sup>42</sup>.

Tio estis granda organizaĵo kaj tie li partoprenis kiel studento. Ĉu li absolvis<sup>43</sup> iun instituton, tion mi ne scias. Eble la revolucio ne permesis al li.

**DB:** ... ĉar mi demandas pro aparta kaŭzo. Drezen dum 1934-35 ekokupiĝis tre intensive pri lingvo kaj pri terminologia normigado<sup>44</sup>. Li iniciatis la tradukon de la libro de Wŭster pri lingvo-normigo<sup>45</sup>, kaj ekzistas abundo da artikoloj pri tiu kampo, kiu ja iel estas parenca al Esperanto. Pro tio mi pensas ke li eventuale [...].



Gvidantoj de La Esperanto-movado en Sovetio, en 1924: de maldekstre, ?, Garaŝin, Nekrasov, Drezen, Valentinov, ?.

**GD:** Li laboris kiel gvidlaboranto.

**DB:** Kaj li estis akceptita kiel verŝajne la plej kompetenta, kaj unu el la plej energiaj gvidantoj de SEU. Sed li ne estis prezidanto, sed ĝenerala sekretario.

**GD:** Tio estas egale al prezidanto.

**DB:** Ha! Prezidanto ne ekzistis<sup>46</sup>!

42. Temas pri litografita revueto en Esperanto kun la titolo *Petrograda Btiblioteko*, kiu aperis en 1918 (kp. KUZNECOV 1991, S. 15)

43. "Absolvi" en la uzo de Demidjuk = fini studadon (vd. PIV: absolvi/.

44. Dum la 1990-aj jaroj en rusaj studoj pri terminologio-scienco oni pli kaj pli ofte aprezas la fakan agadon de DREZEN ĉi-riilate. Li nun kalkuliĝas al la fondintoj de la terminologio-scienco de USSR.

45. DREZEN havis intensivajn korespondajn rilatojn kun WŬSTER. Li gvidis la teamon de la tradukistoj. La traduko de WŬSTER 1931 en la rusa fariĝis WJUSTER 1935.

46. Nu, tamen, ĝis 1925 ja DREZEN estis prezidanto de SEU kaj nur poste ĝenerala sekretario (kp. KUZNECOV 1991, p. 24)

**GD:** Ne prezidanto, sed ĝenerala sekretario kaj membro de la sekretarioj.

**DB:** Ĉu vi povas ion diri pri la personeco de Lanti?

**GD:** Lanti estis instruisto, ĉu de mezlernejo, verŝajne, mi ne scias. Ŝajne li instruis desegnon tiam. Li estis tre aktiva. Kiel instruisto en la postmilita Francio, kies ekonomia bonstato estis pli alta ol en aliaj landoj; li povis ĉiujare fari vojaĝojn kaj tiamaniere en la 1922-a li venis en Sovetion kaj eĉ mortis li dum iu vojaĝo [...]<sup>47</sup>.

**DB:** Ĉu Lanti havis iun marksisman kleriĝon, aŭ ion tian?

**GD:** Li estis anarkiisto. Poste, post la oktobra Revolucio li fariĝis komunisto. Li estis en la franca komunista partio. En la jaro 1929a, dum la Lejpciga SAT-kongreso, li diris al mi, ke li forlasis la komunistan partion, ke li ne plu estas membro de la partio. Ĉu li aliĝis al iu alia partio? Mi ne scias. Barthelmess ankaŭ estis komunisto.


**DB:** Ĉu? Li forlasis la partion?

**GD:** Samtempe. Estis tiamaniere. Lanti decidis, ke la bazo ekonomia de SAT estas sufiĉe granda kaj ke li povas jam havi pagatan laboranton, redaktanton, kaj li proponis al tri konataj de li personoj veni en Parizon, por okupi tiun oficon. Tiuj tri estis Barthelmess, Nekrasov kaj Demidjuk.

**DB:** En Parizon!

**GD:** Jes. Mi kaj Nekrasov rifuzis. Barthelmess konsentis, kaj transportiĝis Parizon kaj laboris kun Lanti [...]

**DB:** Kaj ĉu vi povus ion diri pri Spiridoviĉ<sup>48</sup>?



Lanti en 1922.

47. LANTI faris suicidon, do verŝajne ne mortis dum vojaĝo.

48. Efim SPIRIDOVIĈ (1891 - 1935?), bjelorusa (blank-rusa) ĵurnalisto kaj universitata docento, esperantologo, multe klopodis por doni marksisman fundamenton al lingvoscienco, difinante al Esperanto gravan pozicion en ĝi (kp. LINS 1988, p. 347-348, 350-352, 360-362, 374-376), estis enprizonigita kaj verŝajne tie pereis.

Mi tre ofte trovis tiun nomon rilate al lingvistikaj polemikoj. Ankaŭ li verkis kelkajn librojn pri la problemo de internacia lingvo. Kia personeco li estis?

**GD:** Spiridoviĉ loĝis en Ĥarkovo, estis tre aktiva esperantisto, kaj mi konis lin nur kiel esperantiston. Li estis aŭtoro de Esperanto-kurso [...]. Spiridoviĉ, mi konis lin bone, ĉar la eldonado estis dividita inter li kaj CK SEU. Post tio du aliaj Ĥarkovanoj Kolĉinskij<sup>49</sup> kaj Izgur<sup>50</sup> aktive laboris. Poste ili transloĝiĝis al iu alia urbo [...].

Kaj ili laboris tie, estis eldonita Rusa Esperanta vortaro. Tio estis la unua eldonaĵo de SEU, por kiu CK SEU pagis aŭtoron por la laboro en tiu tempo. Do vi povas vidi, ke ni estis jam sufiĉe fortaj, havis sufiĉe fortan ekonomian bazon.



Spiridoviĉ.

**Semjon Podkaminer (SP):** Miĥalski ankaŭ tie estis samtempe?

**GD:** Miĥalski, ne. Pli frue. Li ne loĝis en Moskvo.

**SP:** Ukrainano li estis.

**GD:** Jes, ukrainano. Li kontaktiĝis kun ni, kun la grupo "La Nova Epoko". Inter la unuaj broŝuroj de ni eldonitaj estis du titoloj de Miĥalski. Li estis bona amiko de Nekrasov. Nekrasov mem estis poeto, librojn li multajn verkis. Inter aliaj verkoj estis en Esperanto, granda poemo surbaze de tiu mondkonata verkaĵo... pri erotikaĵoj [...]

Estas tiu verkisto, ĉu itala, mi ne memoras, kiu verkis diversajn rakontojn [...]

**DB:** Ha! *Dekamerono!*

**GD:** Do surbaze de tio li verkis poezian poemon.

49. Viktor KOLĈINSKIJ (1904 - 1937), sekretario de Tutukraina Komitato de Esperantistoj, "unu el la plej aktivaj membroj de SEU" (LINS 1988, p. 295), estis mortpafita en 1937 (Laŭ N. STEPANOV en:

<http://pri-historio.boom.ru/mihxal.htm>, 5.8.07 ).

50. Ilja J. IZGUR (1881 - 1936), aktivulo de SEU kaj en IAREV, mortpafita en 1936 (kp. N. STEPANOV en: <http://pri-historio.boom.ru/mihxal.htm>, 5.8.07 ).

**SP:** Sed ĝi estis presita aŭ ... ?

**GD:** Ne, ĝi restis kiel manuskripto. Li montris ĝin al Lanti, kiam en la jaro 1922a li estis en Moskvo. Sed ĝi restis kiel manuskripto. [...]

**DB:** Kaj Nekrasov, kiun profesion li origine havis?

**GD:** Li estis presisto. Komence. Tiam, en la 20-aj jaroj li laboris en presejo, kiel korektisto, kaj scipovis ankaŭ komposti. Tiun unuan libreton, ambaŭ libretojn unuajn, kiujn eldonis "La Nova Epoko", kompostis Nekrasov mem. Kaj poste la filo estis kunlaboranto de sufiĉe granda moskva eldonejo "Moskovskij raboĉij"<sup>51</sup>.

**DB:** Kaj Spiridoviĉ, ĉu li estis profesia lingvisto aŭ ĉu vi ne memoras?

**GD:** Mi tion ne povas ĝuste diri. Mi konis lin persone. Mi vizitis lin en Ĥarkov, kiam mi tie estis por miaj oficaĵaj aferoj. Sed mi ne povas diri [...].

**DB:** Kaj Miĥalski, ĉu vi eventuale scias lian profesion?

**GD:** Inter poetoj li loĝis poste en Moskvo. Aliaj venis el Jugoslavio. Ĥoĥlov<sup>52</sup>?

**DB:** Alia ..., Ĥoĥlov?

**GD:** Ĥoĥlov. Li venis el Jugoslavio.

**AG:** Do li ne estas rusoj laŭ mia scio.

**GD:** Li estas rusoj. Post la milito, li elmigris, kun la blankuloj, kaj poste revenis. Kaj li loĝis ĉi-tie kaj li mortis mi ne scias kiam, en la 40aj-50aj jaroj. Li loĝis en Moskvo, li laboris en Moskvo. Li estis librotenisto aŭ io simila. Eble Miĥalski ankaŭ io simila estis.

**SP:** Miĥalski estis librotenisto, ŝajnas, ĉe la fervojistoj. Tamen mi ne povas garantii...

**GD:** Ankaŭ mi ne povas, kaj tiam min interesis la personeco [...], nia komuna laboro, kiam li venis printempe [en Leningradon] por komenci la organizan laboron por la SAT-kongreso.

**DB:** Kaj ĉu vi eventuale memoras la tiam junan Bokarjov, kiu devus esti studento, ĉu

51. "Moskva laboristo".

52. Nikolaj I. HOĤLOV (aŭ ĤOĤLOV, 1891 - 1953), ekonomiisto, lernis Esperanton en 1905, verkis poemojn, tradukis, post 1933 deflankiĝis de Esperanto. Kun NEKRASOV tradukis la ĉefverkon de DREZEN pri internaciaj lingvoj (1931).

ne, aŭ jam juna filologo, aŭ ĉu li eventuale ankoraŭ ne estis tiel konata?

**GD:** Bokarjov [...] dum la SAT-kongreso estis tute juna, same juna kiel Willi Zimmermann, kaj li akceptis en Rostov Willi Zimmermann, kiu loĝis tie, en Rostov ĉe Bokarjov. Kaj li fariĝis fakula lingvisto. Kiam? En kiu tempo? Mi ne scias. Mi renkontiĝis kun li, post reveno Moskvon, en la jaro 1956a. Li loĝis tute proksime de mi, kontraŭ tiu Moskva-magazeno. Jen en tiu domo. Sufiĉe ofte mi vizitis lin. Ni ofte veturis al SSOD<sup>53</sup> kune, tien kaj reen.

**DB:** Mi havas ankoraŭ unu demandon, kamarado Demidjuk. Mi menciis, antaŭ ol komencian intervjuon, ESKI. Ĉu vi memoras ion pri tiu kominterna esperanta grupo?

**GD:** Ne. Mi memoras nur unu personon, la nomon mi ankaŭ forgesis. [...] Oĥitoviĉ<sup>54</sup>?

**AG:** Kaj pri Oĥitoviĉ, kion vi povas rakonti?

**GD:** Mi renkontiĝis kun li dum la esperantistaj kunvenoj. Ja foje li aktivis en Moskvo revenante de la kunvenoj. Sed ne pli [...].

**DB:** Pri ESKI, ĉu estis provo enkonduki esperantan komponenton en Kominternon, ĉu ne?

**SP:** Jes, ESKI estis kreita kiel esperanta sekcio de Kominterno. Kiam ankoraŭ ne estis SEU, ĝi estis la unua grupiĝo de komunistaj esperantistoj, sed Komintern malpermesis tiun ĉi sekcion. Laŭ la statuta bazo, ĉar en la decido de Kominterno ĉiu lando povas esti reprezentita de unu sekcio, sed ne de kelkaj sekcioj, kaj jam estis rusa sekcio. Tiam oni ŝanĝis la nomon: Esperanta Komunista Internacio. Restis la samaj literoj: E, S, K, I, sed jam ne estis sekcio de *Komintern*.

**DB:** Do fiaskis tiu provo.

**SP:** Jes. Fondi oficialan sekcion fiaskis, pro formalaj kaŭzoj. Kaj ĝi disiĝis je la fondo de SEU [...].

53. Rusa mallongigo por: "*Sojuz sovetskich obŝĉestv drujby i kulturnoj svjazi s zarubejnymi stranami*" (Unio de sovetaĵ societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj al eksterlando).

54. OĤITOVIĈ (pseŭdonimo de Ort SUNNAM) kaj DREZEN estis la iniciatintoj por ESKI. Pri la provoj kaj malsukceso ĉi-rilate vidu LINS 1988, p. 194 - 195.

**GD:** Mi memoras ke dum iu kongreso de *Komintern* Drezen tre aktive klopodis por interveno kun raporto aŭ io simila. Mi memoras pro tio, ke li invitis min kaj mi devis iri kune kun li en Kremlon, kaj kunporti ekspoziciomaterialon por tiu raporto. Sed nur tiun fakton mi memoras. Kiel ĝi finiĝis? Ĉu ĝi finiĝis aŭ ne? Mi ne scias.

**AG:** La tekston de la raporto mi havas en mia arkivo.

**GD:** Mi devas diri ion ankaŭ interesan el la vivo de Drezen. Drezen estis ekzilita el la partio, li plendis al la [...]

**AG:** En kiu jaro? pardonu! Proksimume.

**GD:** En mezo de la 20-aj jaroj. Mi eĉ ne memoras la kaŭzon. La kaŭzo eble estis tia, ke li havis revolveron kaj, purigante ĝin, li hazarde pafis kaj sin mem vundis, la piedon. Do pro tio eble li estis ekzilita el la partio. Li plendis al la partia kontrol-komitato, ĝis la plej grandaj instancoj de Sovetlando. Estis malsukceso. Kaj lia lasta plendo estis la Kontrol-Komitato ĉe la Komunista Internacio, kaj tiu decidis pri lia restarigo. Kaj tio estis al mi konata.

**DB:** Kaj vi skribis pri tio artikolon defende al Drezen, se mi bone memoras, ĉar oni atakis Drezen kaj ŝajnis, ke li estis karieristo en la partio kaj, se mi ne ege eraras, vi skribis pri tio iun klarigan artikolon en *Sennaciulo*. Ĉu povas esti?

**GD:** Mi ne memoras.

**DB:** Mi rigardos hejme.<sup>55</sup>

**GD:** Jen verkoj [...] per diversaj literaturaj nomoj [...].

**DB:** Ha! Donu ilin, ĉar tio estas grava.

**GD:** Mi memoras kelkajn ...

**DB:** ... tiel nomatajn plumnomojn.

**GD:** Plumnomoj, jes. Miaj estis Godeo, Gedom<sup>56</sup> povis esti. Nekrasov: diversaj kom-

55. Mi rigardis: La afero estis iom alia: en *Sennaciulo* N-ro 353 (9.7.1931), ankoraŭ aperinta en Leipzig, Norbert BARTELMES kaj Louis GLODEAU (Ludoviko Glodo) publikigis forte atakan artikolon kontraŭ Drezen. Repliko aperis en *Internaciisto* N-ro 25/26 (oktobro) 1931 de Roman NIKOLSKIJ.

56. Mi krome trovis: Gedeo, G-em, G. Dem, Dem.



binaĵoj kun 'Nik'. Se mi havus *La Novan Epoko*'n mi tuj rememorus.

**SP:** La tradukon de *La Ŝtato kaj la Revolucio* de Lenin<sup>57</sup> li subskribis ne per sia plumnomo, sed per sia ĝusta nomo.

**GD:** Estis kiam mi komencis labori aktive por *La Nova Epoko*. Do mi petis la kamaradojn, NovaEpokanojn, Nekrasov, Futerfas: "Mi deziros ion pli multe fari, ni havas eblon traduki ion, kion vi konsilas al mi?" kaj anarkiisto Futerfas, konvinkita anarkiisto, diris tuj: "Ni traduku *La ŝtato kaj la revolucio*, t.e. la plej gravan verkon, kaj ĝi interesos multajn". Kaj mi tiam en mia 1923-a, 24a- 25-a jaro laboris; verŝajne la manuskripto estis sendita jam en la jaro 1924-a, ĉar en 1926-a dum la SAT-kongreso en Leningrado mi jam havis la libron, presitan en Francio. Kaj poste ĝi estis represita en Japanio.

**SP:** Vi ne ĉeestis la fond-kongreson de SEU?

**GD:** Ne.

**SP:** Ĉar mi havas unikan fotadon de la tuta kongreso. Ĉiuj partoprenintoj, kaj vi tie, kaj Drezen, Futerfas estas tie, Valentinov<sup>58</sup> ktp.

**GD:** Ne, mi ne estis tie. Mi nenion sciis pri la kongreso de SEU.

Mi revenis Moskvon. Jen kiamaniere: En la jaro 1918-a en aprilo, mi revenis Moskvon el la cara armeo. Mi estis tie elektita en la soldatan komitaton de divizio, en militrevolucion komitaton de divizio kaj kune kun la artileria regimento ni veturis al Siberio, al Omsk, kie ni malorganizis multon kaj revenis en aprilo. Ĉion ni transdonis al Omska Soveto.

**SP:** En 1921-a?

**GD:** Ne, en 1918-a. Jes, ĉion mi transdonis

57. LENIN (V. Uljanov): *Ŝtato kaj Revolucio*. Laŭ la 2-a ruslingva eldono tradukis G. Demidjuk. Paris-Leipzig-Moskvo: SAT (Eldona Fako Kooperativa), 152 p. (presita en Parizo). Aperis represo en Japanio: Oosaka: Librejo Pirato, 1967.

58. M. S. VALENTINOV, membro de CK SEU.

al la Omska Soveto de soldatoj, kulakoj, laboristoj kaj kamparanoj [...] la parton de la eksplodaĵoj restintaj de la mondmilito... (*Sekvas temsalto: informoj pri la profesio de Demidjuk* – DB)

**GD:** Tiu afero kreskis [...].

En la kuranta majo (do 1982) en la domo de profesiaj organizaĵoj okazos solena kunveno, kiam estos festata la 50-a jubileo de la trusto "*Sojuzvzryvprom*", kies unua ĉefingénieurio mi

estis. Ĝi estis organizita en la jaro 1932a, kaj antaŭ tiu trusto ĝi estis "*Vzryvsel'prom*"<sup>59</sup> kaj en februaro 1932-a ĝi estis reorganizita kiel trusto. Mi estis la unua ĉefingénieurio de la trusto kaj mi laboris ĝis la jaro 1938-a.

Do mi havos bonŝancon renkontiĝi kun multaj, kun kiuj mi laboris.

**SP:** Estas interesa kaj emociiga afero.

**GD:** Jes. Estas kelkaj kamaradoj, kiuj en la jaro 1932-a absolvis la mineksplozistatan teknikumon, kiun mi organizis,

kaj kie mi instruis. Kaj antaŭ nelonge ni renkontiĝis, post 50 jaroj. [...]

**DB:** Mi havas plian demandon: ĉi-jare ni havas jubileon de la fondiĝo de IPE<sup>60</sup>, la kvindekan. Ĉu vi havis iun rilaton al la fondo de IPE?

**GD:** Kiam okazis skismo kaj ni komprenis, ke komuna laboro kun SAT-gvidantoj ne estas ebla, ni serĉis novan formon por laboro. Pro tio venis tien ĉi viziti nin, al Drezen, Kampfrad<sup>61</sup>. Ni intertraktis tiun IPEn. Ni fondis kaj ŝajnas al mi, ke ni komencis tie ĉi presi tiun gazeton *Internaciisto*. La unua numero ŝajne, kie aperis ...?

59. Entrepreno de eksplodaĵindustrio, kie GD laboris ekde 1930 "organizinte pacan aplikadon de eksplodaĵoj en agrikulturo kaj industrio" (laŭ letero de 28.6.1983 al Oleg KRASNIKOV).

60. La "Internacio de Proleta Esperantistaro" (IPE) fondiĝis 1932 en Berlino kiel komunisme orientita organizaĵo, kiu sin komprenis kiel kontrasto al SAT. (Vidu BLANKE 1986c kaj, kun aliaj akcentoj, LINS 1987).

61. Kaj Otto BÄSSLER.

LA GAZETO – n-ro 133 – 15dec07



Bässler kaj aliaj, kiel estis malbenita la batalo de Spartak. Ĉar dum longa tempo oni tiamaniere edukis germanojn, ke ili povas nur sur vojeto piediri, neniel sur herbo. Kaj tiel la spartakistoj: ili atakis kaj retiris sin, ĉiam sur tiuj vojetoj, neniam sur la herbo. Kaj tio estis la kaŭzo ke ni malgajnis<sup>68</sup>.

**DB:** Interese. Do mi devas diri, ke tiu intervjuo kaj la multaj faktoj estis ege interesaj ĉar ili kompletigis, ni diru, la bildon pri la historio de SEU el tre kompetenta buŝo kaj aldonas ankaŭ novajn, nekonatajn faktojn, kaj mi nur povas esprimi la deziron, reesprimi ĝin; vi scias, ke mi skribis al vi petante, ke eble iam vi verku viajn rememorojn, ke vi trovu forton, sed [...]

**GD:** ... se mi povus trovi tempon!

**DB:** [...] ĉar mi scias, ke estas malfacile, kaj pro tio mi do kaptis tiun eblecon simple pli malpli perforti vin. [*Ili kune ridas*]. Do mi kore dankas. [...]

**GD:** Tamen vi scias, ke mi tre multe laboras dum la lasta tempo. Estis eldonitaj multaj libroj, originale, en rusa lingvo.

**DB:** De vi?

**GD:** Jes, kaj sub mia redakto tradukoj el angla, el germana lingvoj [...]

Kiam mi laboris aktive en SEU, fakte mi povis dormi nur 4-5 horojn.

**AG:** Ĉu vi scias, kion faris kamarado Drezen dum kaj tuj post la Revolucio? Ĉu vi estis ligitaj en tiu momento?

**GD:** Tiamaniere ni estis ligitaj: mi estis soldato, kaj li ankaŭ. Li estis studento de Leningrada politeknika instituto. [...]. Do,

68. La tuta alineo al mi ne estas klara. El la Spartakus-grupo, fondita de Karl LIEBKNECHT kaj Rosa LUXEMBURG en 1918, ja poste formiĝis la Komunista Partio de Germanio (DB).

revolucio estas revolucio, kaj apartaj homoj trovas sian sorton.

**AG:** Ne nur! Ĉu li aktive partoprenis, kun pafilo ktp.?

**GD:** Tion mi ne scias. Mi aŭdis, ke li estis komandanto de *Pavlovskij prospekt*<sup>69</sup> [...]

**AG:** [...] Ŝajne li perlaboris tiun oficon



Grigoriy Demidjuk, 80-jaraĝa, en 1975.

**GD:** Unuafoje mi konatiĝis kun li en loĝejo de Nekrasov, verŝajne en la jaro 1920. Mi vizitis lin tie, ni interparolis. Kaj poste mi dum multaj jaroj kunlaboris kun li en Centra Komitato de SEU. [...]. Li estis bona organizanto. Li estis altkultura, tre erudita. Li multe interesis sin pri lingvo-problemoj, pri la internacia lingvo. En lia biblioteko estis la Unua Libro de Zamenhof, kaj multaj Volapükaj kaj ĉiuj sistemoj, projektoj; li ĉion kolektis, kiamaniere mi ne scias, kaj ofte, kiam la kunsido de la Centra Komitato de SEU okazis

en lia loĝejo, mi ĉiam vidis tiujn librojn, kaj li tre multe okupis sin pri tiu fako. Li verkis en la rusa lingvo sufiĉe ampleksan libron pri interlingvistiko<sup>70</sup>.

**AG:** Kiel vi memoras? Ĉu kamarado Drezen antaŭsentis la likvidigon de SEU? Aŭ ne? Ĉu estis iaj paroloj pri tio?

**GD:** Mi ne scias. Mi tute hazarde eksciis pri lia malapero.

**AG:** Kaj ĉefe ne sciis, kiel li malaperis?

**GD:** Mi ne sciis. Mi telefonis al lia hejmo kaj lia edzino<sup>71</sup>, kiu estis ankaŭ esperantistino – ŝi tradukis tiun verkon *Disrompo* – [...] kaj ŝi

69. Temas pri avenuo.

70. Temas pri DREZEN 1928, kiu estis fotokopie reproduktita en 2004 (Moskvo: URSS).

71. La edzino de DREZEN, Elena K. SAZONOVA (1899-1937) tradukis ĝenan titolon: LAVRENEV, Boris A. (1931), *Disrompo*. (kun antaŭparolo de E. DREZEN). Leipzig: EKRELO, 47 p.

diris al mi: “Ĉu vi ne scias, ke li malaperis?”. Kaj mi bezonis trovi, volis demandi la adreson de Ŝumilov<sup>72</sup>. [...] Tiam li estis en Moskvo, en tiu popolkomisariejo de Arbaraferoj kaj Ligno-aferoj. [...] Kaj poste ŝi mem ankaŭ malaperis. Kaj poste, kiam en la 60-aj jaroj, 70-aj jaroj, oni klopodis por ke Drezen estu rehabilitita, la fratino de lia edzino diris, ke ŝi neniam subskribos tiun peton – necesas ke iuj parencoj petu revizii la akuzon. Kaj ŝi rifuzis. Kaj tion faris nur la filino de lia frato. Lia frato laboris en Leningrad, en iu arkiva organizaĵo.. Li multe helpis al ni, sendis multan materialon, kiam estis ellaborita la libro *Na putjaŭ k mejdunarodnomu jazyku*<sup>73</sup> ĝuste pri la rilatoj de carismo al Esperanto, pri la polico ktp.

Do sekve nun, antaŭ kelkaj jaroj [...], li<sup>74</sup> loĝis en Moskvo jam delonge, eble 30 jarojn. Li estas sufiĉe aktiva maljunulo. Li diris al tiu organizaĵo: “mi deziras ke lia nomo estu rehabilitita”, li diris “venu por du tagoj”, kaj kiam mi venis, li diris al mi, ke li jam estas delonge rehabilitita laŭ la peto de la filino de lia frato.

Mi diris, ĉu mi zorgu ke la fratino de mia edzino ion subskribu? Estis nenecese, li estis jam delonge rehabilitita.

Li estis – tiel mi komprenas la aferon – akuzita pro tio, ke li laboris kaj prenis sufiĉe da aktiva laboro en la antaŭulo de SSOD<sup>75</sup>. Ĝin prezidis Kameneva<sup>76</sup>.

**AG:** Ĝi estis organizaĵo antaŭanta SSOD?

**GD:** Antaŭanta SSOD, jes, jes, jes, jes.

**AG:** Oni ĝin poste ankaŭ likvidis, jes.

**GD:** Jes, likvidis, jes. Do prezidis la edzino de Kamenev.

**AG:** Jes, klare.

72. Pavel N. ŜUMILOV (1897-1972), li estis komandanto de Ruĝa Armeo, membro de CK SEU, ĝenerala sekretario de SEU post E.K. DREZEN (post 1936, je la propono de DREZEN mem), transvivis 18 jarojn da punlaboro (Kp. LINS 1988, p. 395; DANOVSĜIJ 1993; persona informo de A. SIDOROV).

73. DREZEN 1926.

74. Ne estas klare kiu faris kion kaj pri kiu persono temas. La frato de DREZEN, Arvid Karloviĉ DREZEN ankaŭ pereis (kp. KUZNECOV 1991, p. 29.). Eble temas pri la filo de A.K. DREZEN.

75. La antaŭulo de SSOD estas VOKS (Tutunia organizaĵo por kulturaj ligoj kun eksterlando).

**GD:** ... kaj pro tio Drezen ankaŭ estis akuzita. Estas tre karakterize, kiam mi pet-skribis pri la rehabilitigo, tiam mi ricevis sufiĉe grandan, kelkpaĝan decidon, ke en mia akuzo estis skribite, ke min varbis Drezen; sed en la afero de Drezen nenie, ke li varbis Demidjuk. Kaj tio, paŝon post paŝo, familio post familio, oni ĉion klarigis, venas al tio, ke la homo estas senkulpa. Estis grandaj laboroj, kiuj estis faritaj kaj pro tio oni danku al Ĥruŝĉov.

**AG:** Mi volas diri, ke estis iu diraĵo de Drezen [...] en la izolejo, li tiel diris: parolis, parolis, kaj «*naporolisj*» ...<sup>77</sup>

**GD:** Mi ne scias, ĉu iu lin vidis tie, sed mi scias, ke li estas morta.

**AG:** En kiu jaro proksimume?

**GD:** En la jaro 1937-a verŝajne.

**AG:** En Moskvo?

**GD:** En Moskvo. Tion mi scias. Kaj post li malaperis lia edzino kaj mi estis forsendita el Moskvo. Nigraj jaroj, bedaŭrinde.

**AG:** Jam en la revuo *Esperanto* mi legis artikolon pri la “flavaj gantoj de Drezen”<sup>78</sup> en kiu oni akuzis lin, malvere jes?

**GD:** Vi scias: oni povas penti. Se vi legis historion de SAT, ĝi estas laŭda al Lanti kaj insulta al Drezen kaj aliaj [...]

(*La intervjuo direktiĝas al fama esperantisto, kiu ludis rolon en la partio – DB*).

**DB:** Prezidanto de la unua kongreso de la partio?

76. Olga KAMENEVA (1883-1941) prezidis VOKS de 1925-1929. Ŝi estis la unua edzino de Lev B. KAMENEV (1883-1936). KAMENEV post la morto de LENIN kunlaboris kun STALIN, i.a. senpotencigante TROCKIJ; en 1934 arestita pro “komplikeco lige al murdo je KIROV”, kaj ekzekutita en 1936. (kp.

Kp.: [http://en.wikipedia.org/wiki/Lev\\_Kamenev](http://en.wikipedia.org/wiki/Lev_Kamenev), 5.8.07.

Sergej M. KIROV (1886-1934 estis partia gvidanto, i.a. sekretario de CK de KPSU. Ekzistas supozoj, ke STALIN iniciatis la murdon je KIROV, por preteksti la amasajn persekutojn dum la 1930aj jaroj:

Kp.: <http://www.bartleby.com/65/ki/Kirov-Se.html>, 5.8.07.

77. *naporolisj* estas rusa vorto, kiu tradukiĝas kalke “surpikiĝis” aŭ “surpikiliĝis” ... (do torturita).

78. Artikolo de Ed BORSBOOM *La flavaj gantoj de Ernest Drezen en Esperanto* 67 (1974) N-ro 823 (7-8/74), p. 130-131. En la artikolo, kiu ŝajne restis sen respondo en la revuo, BORSBOOM ĵetas negativan lumon al DREZEN.

**GD:** Kiu okazis en Minsk.

**DB:** Kaj li estis esperantisto?

**GD:** Li estis esperantisto.

**AG:** Kaj lia nomo?

(*sekvas neklara diskuto pri nomo – DB*)

**SP:** Estis malgranda kvanto da homoj, eble dudek-ok.

**GD:** Li loĝis en Moskvo. Mi kune kun Nekrasov estis en lia loĝejo en tiu granda domo, kaj li verkis kune kun Nekrasov broŝuron pri ... Mi ne memoras la nomon de tiu broŝuro.

**AG:** Kaj temo de la broŝuro?

**GD:** Temo de la broŝuro estas ne pri Lanti persone, sed pri tiu direkto ...

**DB:** Ejdel'man?

**GD:** Ejdel'man! Li estis kune kun Nekrasov. Li verkis, jes, estis eldonita tiu broŝuro [...] <sup>79</sup>.

**DB:** Ejdel'man estis partia gvidanto, en Minsk?

**GD:** De la unua kongreso. Prezidanto aŭ partoprenanto, pri tio mi ne povas insisti, ke ĝuste prezidanto. Sed li partoprenis ĝin.

**DB:** ... la unuan kongreson de Komunista Partio de Sovetunio?

**SP:** Estonta Komunista Partio. Oni tiam nomis ĝin Socialdemokrata Partio. Verŝajne en mil-okcent-naŭdek ...

**AG:** ... mil-okcent-naŭdek-ok-a.

**DB:** Do li jam estis maljuna kiam li verkis tion.

**GD:** Jes, sufiĉe maljuna.

**AG:** Tre interesa fakto.

**GD:** Estis post 40 jaroj, do verŝajne li estis 70- aŭ 75-jara tiamaniere <sup>80</sup>.

**DB:** Do ĝi estas la unua analizo pri lantiismo, de tiu Ejdel'man.

**GD:** Jes, jes, jes.

(*Per tio finiĝas la registraĵo, sekvas dankvortoj de la intervjuinto kaj, post tio, neformala daŭrigo de la interparolo – DB*)

79. Temas pri EJDĚL'MAN, B.L./NEKRASOV, N. (1930): *Sennaciismo kaj internaciismo*, Moskvo: SEU.

80. Boris EJDĚL'MAN (1867-1939). En 1930 li estis 63-jara.

## Mallongigoj

ASE: Asocio de Sovetiaj Esperantistoj

CK: Centra Komitato

EKRELO: Eldonkooperativo de Revolucia Esperanto-Literaturo

ESKI: Esperanto-Sekcio de Komunista Internacio

GDR: Germana Demokratia Respubliko

GDREA: kutima mallongigo por la GDR-a Esperanto-Organizaĵo

GLEA: Germana Laborista Esperanto-Asocio

IAREV: Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantistaj Verkistoj

IPE: Internacio de Proleta Esperantistaro

KPUSSR: Komunista Partio de Unio de Socialistaj Sovetrespublikoj

MEM: Mondpaca Esperantista Movado

SAT: Sennacieca Asocio Tutmonda

SEU: Sovetrespublikara Esperantista Unio

SSOD: *Sojuz Sovetskich Obŝĉestv Drujby i kulturnoj svjazi s zarubeŝnymi stranami* (Unio de sovetiaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun eksterlando)

VCIK: *Vsesojuznyj Central'nyj Ispolnitel'nyj Komitet* (Tutruslanda Centra Ekzekutiva Komitato de sovetoj – kvazaŭ la ministraro de USSR)

VOKS: *Vsesojuznoe Obŝĉestvo Kulturnoj Svjazi s zagranicej* (Tutunia organizaĵo por kulturaj ligoj kun Eksterlando).

## Bibliografio

BLANKE, Detlev (1986a, Red.): *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio (2-a eldono; 1-a eldono 1978), 228 p.

BLANKE, Detlev (1986b): *La kontribuo de la laboristaj esperantistoj por la evoluo de la germana-soveta amikeco en la tempo de la Respubliko de Weimar*. En: BLANKE 1986a, p. 63-83.

BLANKE, Detlev (1986c): *La Internacio de Proleta Esperantistaro*. En: BLANKE 1986a, p. 50-62.

BLANKE, Detlev (1991): *La historio de EKRELO*. En: ZAJCEV, Igor / ŜEVĈENKO, Aleksandr (Red., 1991): *Impeto '91*. Moskva: Progres, p. 69-89.

BORSBOOM, Ed (1976): *Vivo de Lanti*. Paris: SAT, 273 p.

DANOVSKIJ, Nikolai (1993): *La lasta ekflamo de SEU*. En: *Spektro*, N-ro 2, p. 14-16.

DREZEN, E. K. (1926, Red.): *Na putjaĥi k meĵdunarodnomu jazyku. Sbornik statej. Pod obŝeĵ redakciej E. K. Drezena*. Moskva-Leningrad: Gosudarstvennoe izdatel'stvo, 168 p. (*Survoje al la internacia lingvo. Kolekto da artikoloj, sub ĝenerala redakto de E.K. Drezen*).

DREZEN, Ernest K. (1928): *Za vse-obŝĉim jazykom. (Tri veka iskanij)*. S predisloviem akademika N. Ja. Marr. Moskva-Leningrad: Gosudarstvennoe izdatel'stvo, 271 p. (rusa originalo por la esperantlingva eldono Drezen 1931; teksto-fidele represita 2004 en Moskvo).

DREZEN, Ernest K. (1929): *Zamenhof*. Leipzig: SAT, 49 p.

DREZEN, Ernest K. (1931): *Historio de la mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado*. Leipzig: EKRELO, 242 p.

DREZEN, Ernest (1992): *Historiaj studoj*. Jekaterinburg: Sezonoj.

KOLBE, Ino (1996): *Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig (Westsachsen). Teil I und II. Von den Anfängen bis zum Verbot (1933)*. Komentita kaj redaktita de Detlev BLANKE. Leipzig: Landesverband Sachsen des Deutschen Esperanto-Bundes e.V., 1996, 70+170 p. ISBN 3-00-000530-7 (+23 p., *Pri la historio de la Germana Laborista-Esperanto-Asocio en Leipzig* [Okcidenta Saksio], dokumentoj, kun resumo en Esperanto).

KUZNECOV, Sergej N. (1991): *Drezen, lia verko, lia epoko*. En: DREZEN, E. (1991): *Historio de la Mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado*. Kvara Esperanto-eldono. Redaktis kaj komentis S. KUZNECOV. Moskvo: Progreso, (454 p.), p. 3-40, 449-452.

LINS, Ulrich (1987): *La baraktado de IPE. Ĉapitro el la historio de la laborista Esperanto-Movado*. En: *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. Vol. II esperantismo*. La Laguna: Universidad de la Laguna, p. 353-369.

LINS, Ulrich (1988): *La danĝera lingvo. Studoj pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Gerlingen: Bleicher. (Represo 1990, Moskva: Progreso, kun postparoloj de Sergej KUZNECOV kaj Detlev BLANKE).

MIĤALSKI, Eŭgeno (1994): *Plena Poemaro 1917-1937*. Redaktis William AULD. Kun *Enkonduko* de Krys UNGAR. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 176 p.

RUBLOV, Sergej G. (1929): *Kruĵok Esperanto. Praktičeskoje posobie dlja gruppoviĥ zanjatij*. Moskva: SEU.

SIDOROV, Anatolo (2005): *Grigorij Demidjuk – motoro de la sovetia esperantista movado de la 1920-30 jaroj*. En: *Rusia Esperanto-Gazeto* (REGO) 1 (26), p. 2-7.

STEPANOV, Nikolao (1992): *Tri renkontiĝoj kun N.K.V.D.* En: *Sennaciulo*, N-ro 5, p. 53-55.

STEPANOV, Nikolao (1993): *Futurfas: sorto de unu anarkiisto esperantisto*. En: *Sennacieca Revuo*, 1993, N-ro 121, pp. 6-10.

WÜSTER, Eugen (1931-1970): *Internationale Sprachnormung in der Technik – besonders in der Elektrotechnik. Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung*. Berlin: VDI. (Represoj kun aktualigitaj

aldonaj ĉapitroj: 2-a eldono Bonn: 1966, 3-a eldono Bonn: 1970).

WJUSTER, E. (1935): *Meĵdunarodnaja standartizacija jazyka v tehnikе*. Moskva: Standartgiz (Iom koncizigita traduko de WÜSTER 1931), 302 p.

ndlr: Komence de 2008 aperos rusingva libro kun du partoj, kiu pliprofundigos multajn temojn, menciitajn en la intervjuo:

Oleg I. KRASNIKOV: *Istorija Sojuza Esperantistov Sovetskij Respublik (SESr)*. (*Historio de Sovetrespublikara Esperantista Unio* [SEU]). Detlev BLANKE: *Istorija raboĉego esperanto-dvijenija [IPE, EKRELO,*

*Esperanto i socializm]* (*Historio de Laborista Esperanto-Movado [IPE, EKRELO, Esperanto kaj socialismo]*). Moskva, Impeto, 2008.

